ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 5

Majo 2016 Kol. 373/32

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: La 10-a E-Semajno en Les Issambres, Brila E-renkontiĝo, El la redakcio, SAT-kongreso en Herzberg, La Tri-landa kongreso en Bandung

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La 10-a Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres la 5.3. – 12.3.2016

Okazis en la sud-franca feriejo « Vacanciel ». En la bela hotelo « Val d'Esquières » ĉirkaŭ cent personoj el dek landoj venis ĝui agrablan etoson ĉe la marbordo de la Mediteraneo. La eventon ĉeestis ankaŭ du-jaraĝa aminda knabineto, Marietta.

La ĉeforganizantinoj Christine Grassaguel kaj Monique Prezioso helpata de siaj familianoj kaj de aliaj esperantistoj pretigis por ni allogan programon ĉe la Lazura Marbordo en *Les Issambres*. Dum la interkona vespero ni konatiĝis kun la instruantoj de la diversnivelaj Esperanto-kursoj.

Ĉiumatene la tago komenciĝis per tri Esperanto-kursoj, dum tri horoj. La posttagmeza instruado, antaŭ la vespermanĝo, daŭris unu horon. La komencantojn instruis Jindřiška Drahotová el Ĉeĥio, kiun asistis por spertiĝi en la instruado ŝia samlandanino Jaroslava Malá.

Pli spertajn esperantistojn sprite gvidis kaj multe paroligis Gražina

Opulskiene el Litovio. Por la bone parolantoj Miguel Gutiéres Adúriz el Hispanio prezentis mikronovelojn, montris al ili kiel publikigi filmojn en la reto kaj ankaŭ kantigis ilin. Ĉiuj partoprenantoj de la kursoj certe plibonigis sian lingvonivelon dum tiu unusemajna studado.

Dum la matena paŭzo la partoprenantoj teumis aŭ kafumis kaj interbabilis. Je la dispono estis ampleksa libroservo prizorgata de gesinjoroj Schneider kaj Claudie Demongeot. Pluraj ĉeestantoj aĉetis E-librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Intereson vekis ankaŭ miaj fotoalbumoj kun raportoj pri diversaj Esperanto-aranĝoj.

Post la bongusta tagmanĝo bela vetero favoris promenadojn en la ĉirkaŭaĵo kaj ekskursojn al pli foraj lokoj. Vespere okazis diversaj prelegoj kaj bild-prezentoj.

Dimanĉe kelkaj el ni vizitis la urbon *Fréjus* dum aliaj ĝuis ĉokoladan feston en la apuda urbeto *Roquebrune-sur-Argens.* Tie ni admiris grandegan ĉokolad-tabulon. Ĝi pezis 220 kg-ojn, estis du metrojn longa kaj dek centimetrojn dika. Poste oni dispecigis ĝin kaj disdonis al la vizitantoj. Vespere ni spektis la teatraĵon « La Viro-Semo », kiu estis prezentita ankaŭ dum la UK en Lillo.

Marde okazis ekskurso al la fuorto de *Brégançon*. Sur la insuleto troveblas impona roko kaj estas sur ĝi majesta fortikaĵo, kiu fariĝis ŝtata rezidejo de la francaj prezidentoj. La nuntempa prezidento François Hollande decidis malfermi ĝin al la publiko en la jaro 2012. Eblas viziti ĝin de majo ĝis septembro. Multaj interesiĝas pri tiu fama loko kaj ĉiujare ĝi estas amase vizitata.

En la hotelo, kie okazis la aranĝo ni tre bonguste kaj abunde manĝis. Dum libera tempo iuj kartludis, aliaj lernis danci, legis aŭ komputilis. Eblis ankaŭ partopreni en distraj aktivaĵoj kaj aliaj proponoj de la hotelo mem. Kelkaj el ni profitis tion.
Ni povis partopreni en diversaj vortludoj, dancado, manlaboroj, enigmoj, gestumo, skrablo, karaokeo-kantado ktp.

Kelkfoje dum la semajno en la hotelo instaliĝis vendistoj, kiuj proponis al la gastoj varojn por aĉeti. Inter ili troviĝis diversaj memoraĵoj, parfumoj, artikloj el lavendo, sapoj, mantukoj, juveloj, mansakoj, koltukoj varia sortimento da infuzaĵoj, teoj, mieloj kaj marmeladoj ktp.

Pri nia evento aperis en la loka ĵurnalo « *Varmatin* » favora artikolo kun komuna foto de la partoprenantoj. La titolo estis: « *Communication sans frontières aux Issambres* » (Komunikado sen baroj en Issambres).

Merkrede ni trarigardis la arkeologian muzeon en la urbo *St. Raphaël* kaj en la kultur-domo estis instalita bild-ekspozicio, kies temo estis kvadratoj. Tie ni povis admiri ankaŭ fotojn de Pascal Vilain. Li loĝas

en tiu regiono kaj parolis al ni pri sia fotad-hobio.
De Gražina Opulskiene ni eksciis pri la rilato de nia Majstro Zamenhof kun Litovio. Pri neceso de Esperanto en Eŭropo kaj pri la projekto TUJ parolis Thierry Saladin.

De Guy Perrin ni akiris informojn pri la unua irana kongreso en Teherano, en kiu li partoprenis. Li montris bildojn kaj per ili ni ekkonis la ĉefurbon kaj spektis aliajn belaĵojn de la lando. Same interesa estis bildprezento pri Ĉilio, kiun prezentis Jean-François Coussineau. Aldonajn bildojn pri la Pasko-insulo komentis Christine Grassaguel.

Dum la adiaŭa vespero la organizantoj pretigis tombolon, en kiu ĉiu gajnis ion. Sur la scenejo la partoprenantoj distris nin per kantoj, skeĉoj kaj aliaj amuzaj eroj. Ĉe la fino estis pridonacitaj la kursgvidantoj kaj la organizantoj. Al ĉiuj plaĉis la akordiona muziko kaj la gaja dancado daŭris ĝis la noktomezo.

La aranĝo estis sukcesa, bela vetero kontribuis al la bona humoro de la partoprenantoj kaj ĉiuj bonfartis. Ni ĝuis agrablan semajnon en gaja etoso kaj promesis reveni venontjare al la sama, alloga loko ĉe la Bordo Lazura.
Koran dankon al la organizantoj pro ilia strebo kaj bona laboro.

Liba Gabalda

Brila Internacia Esperantista Renkontiĝo (BIERO)

Kun la grupo de esperantistoj E-mental ni jam naŭfoje esploris bierfabrikojn, nuntempe en la urbo Jihlava.
Ni estis 11 enlandanoj kaj 7 eksterlandanoj en la tagoj 11. — 13. 3. 2016. Ĉe la trarigardo de loka bierfabriko ni ne nur testis la kvaliton de loka biero kun la nomo Ježek (Erinaco), sed ĉefe ni konatiĝis kun la historio de la urbo, ni trarigardis parton de la Jihlava subtero(ejo)

kun faka klarigo pri minado de arĝento kaj stampado de moneroj kaj grimpis 176 ŝtupojn sur la mezepokan belvidejan urban turon.

Ni plenumis ankaŭ testojn pri E-scioj, ludis diversajn ludojn, ekzemple kant-rimaĵon "Ora pordego malfermita" sur la strato, kio precipe plaĉis al la eksterlandanoj. Sed ni vizitis ankaŭ malliberejon, kie ni tuŝis diversajn torturilojn kaj ni admiris kolekton de ornamitaj historiaj pistoloj. Poste ni tre amuziĝis en la te-rura groto "Infana fantoma labirinto" kaj sur la 3D tapiŝeto.



Tiun ĉi BIERan renkontiĝon ni organizas dufoje jare ĉiam en alia ĉeĥa urbo por interesiĝantoj pri netradicia ĉambra internacia renkontiĝo kun esperantistoj ĉe la faka trarigardo de bierfabrikoj kaj aliaj aktivaĵoj. Tiamaniere ni jam ekkonis la ĉeĥajn urbojn Žatec, Pardubice, Vyškov, Pelhřimov, Nová Paka, Havlíčkův Brod, Příbram kaj Poděbrady.

La biergustumado estas ĉiam eminenta, sed la plej grava estas bela komune travivita tempo inter niaj geamikoj. Kompreneble, ke Esperanton ni ankaŭ propagandas en tiuj urboj.

Lenka Angelová

El la redakcio:

Kelkaj niaj membroj demandis min, kiu estis la profesoro Lukáš (vidu la artikolon el aprila Informilo). Jen ĉi tie la klarigo:

Miloš Lukáš (*15.9.1897 † 26.4.1976) estis profesoro de klasikaj lingvoj, aŭtodidakta poligloto, kiu scipovis 35 lingvojn. Ofte mi legis en diversaj ĉeĥaj ĵurnaloj, ke la artikolon tradukis M.L. el la estona lingvo, en pluaj el la hungara, latva, latina, albana... Post sia studo en filologia fakultato de Karolo-universitato en Prago, li instruadis en gimnazioj de kelkaj urboj.

De la jaro 1907 (kiel dekjara knabo) li komencis dediĉi sin al Esperanto, kie li tre frue atingis bonegajn rezultojn.
Li estis eminenta tradukanto, eble de li la plej konata teatraĵo estas la „Nokto en Karloŝtejno“ (Noc na Karlštejně) de Jaroslav Vrchlický, kiu estis prezentita okaze de la 13-a UK en Prago kaj la „Muta barikado“ de Jan Drda. Tiu lasta estis tradukita en la japanan kaj ĉinan lingvojn.

Li esperantigis pli ol 170 poemojn, kaj pli ol 100 prozaĵojn. Multajn poemojn li tradukis en ĉeĥan lingvon de famaj esperantistoj: Baghy, Kalocsay, Zamenhof, Schwartz. Originale li verkis ĉeĥe, slovake kaj esperante. Jarmila Rýznarová

SAT kongreso 2016 en Herzberg am Harz

okazos en la tagoj 16.7.2016 – 23.7.2016, la loka OKK invitas vin partopreni. Rimarko: Post la SAT kongreso tuj sekvas UK en Nitra.
La partoprenkotizo por nemembroj de SAT: ĝis la 30-a junio 65,-€ ; poste 70,-€. Partoprenintoj el Ĉeĥio kaj Slovakio ĝuas 30% rabaton.

Programo, vizitoj, ekskursoj: unika esperant-tipa programo kun multaj kulturaj, aktualaj kaj sociorilataj temoj. Interesaj vizitoj kaj ekskursoj, ekz. al la bela grandurbo Hanovro, al la universitata urbo Göttingen. Pri la loĝado – pluaj detaloj ĉe s-ano Václav Stibůrek, J.Franka 1731, 256 01 Benešov u Prahy, mail:stiburek.v@seznam.cz

La Tri-landa Esperanto-kongreso en Bandung

Ĝi okazis de la 23-a ĝis la 28-a de marto 2016 en la urbo Bandung, kiu situas 123 km-ojn oriente de la ĉefurbo de Indonezio, Jakarta, sur la insulo Java. Mi ne mencias kiom longe necesas veturi de unu urbo al la alia, ĉar la trafiko estas neantaŭvidebla kaj ofte tre malrapida. Bandung, verŝajne memorigas vin pri la Afrika-Azia konferenco, kiu okazis en aprilo 1955.

En la konstruaĵo de la iama konferenco nun estas muzeo, kie videblas multe da fotoj kaj aliaj memoraĵoj de la konferenco. La estroj de la muzeo estas simpatiantoj de Esperanto. Ankaŭ tie regule renkontiĝas la esperantistoj de Bandung. Pro tio tie okazis la malfermo de la kongreso kaj la unuaj klasoj pri la lingvo Esperanto, sed pro la tre riĉa

programo, estis decidite gajni iom da tempo restante en la hotelo. Image 10/15 minutojn for de la muzeo, por ĉiuj eroj de la programo, krom la “nokto de la muzeo“, nokto kiam la homoj kuniĝas en kaj apud la muzeo por kanti, danci, babili trinkaĵon en la mano.

La plej kompetentaj esperantistoj sekvis AMO-seminarion gvidatan de Stefan MacGill, dum la progresantoj kaj komencantoj sekvis la kursojn de Daniel Kane kaj Franciska Toubale. Esperantistoj de diversaj landoj kaj multe da novbakitaj, junaj, indoneziaj esperantistoj prelegis pri la plej diversaj temoj: manfarado de ŝuoj, Jutubo, orangutanoj, retbabilejoj, la politika situacio en la orienteŭropaj landoj kaj tiel plu. La etoso estis tre gaja, ne nur pro la energio de la germana kantisto Jonny M, sed ankaŭ pro tio, ke la plejparto de la indoneziaj ĉeestantoj estis studentoj. Ne pensu, ke la surmeto de vualo por la studentinoj malhelpas entuziasme partopreni la ludojn kaj dancojn.

Merkrede okazis la tuttaga ekskurso, tiel ke la eksterlandanoj povu malkovri iom pli de la loka kulturo, en la muzeo Sribaduga pri historio kaj Saŭng Angkung Udjo, kie ĉiu konstruis parton de la muzikinstrumento angkung kaj koncertis per tiu instrumento kun vasta aŭskultantaro. Entute amikiĝis cento da homoj el dek landoj: Aŭstralio, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Indonezio, Koreujo, Nov-Kaledonio, Nov-Zelando kaj Singapuro. La espero estas travivi ree similan eventon, ĉu tio eblos en 2018 ?

Raportas Franciska Toubale, Aŭstralio

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj +suplemento ANTAUEN
Eldonas AEH — Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová, J. Kosnar
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.